

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

EKO 2023 / 03. Januaro 9, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

La oka AKE – Afrikanoj kunvenis ĝoje



Ĉi tiu foto venis el la dokumento de unu el la partoprenintoj, plusendita de Adje Adjevi.

Espoir NGOMA KASATI invitas vin konatiĝi kun siaj personaj impresoj pri la kongreso ĉe:

https://uea.org/vikio/Dosiero:Memfoti%C4%9Do.jpg?fbclid=IwAR3yQ2hZn_jS0CXJ9hSiwD3rne3ZF1yY7Z15X-hqKfukuxsAJnjXO3nqTWg

Ekzamenaj tagoj kaj pliaj utilaj agoj

Titolo: KER-raporto pri la Tutmonda Ekzamentago kaj tutjara agado

Kategorio: Laste ĉe edukado

Teksto: Fine de novembro 2022 la KER-Ekzamena Centro de UEA okazigis denove

Tutmondan Ekzamentagon. Historie ĝi estis la 10a tia aranĝo kiam en la sama tago dise en la mondo eblis trapasi la KER-ekzamenojn ĉeeste en ĉiuj funkciaj niveloj de la sistemo, t.e. ankaŭ je la nova nivelo C2. Legu nian raporton pri tiu ekzamentago kaj pri la KER-eventoj kaj atingiĝoj de la jaro. Legu pli ĉe la paĝo <https://edukado.net/novajhoj?id=884>

Z-festado en Sankta Petersburgo

Mi aldonis al Vitubo etan videon kun tri fragmentoj el la koncerta programo, prezentita dum la Zamenhof-tago en la Sankt-Peterburga E-klubo "Kariljono".

Tio estas:

1. Parto de ario de Laŭretta el la opero "Gianni Schicchi", ensemblo "Blua Ponto", kantas Dina Plusnina (ruslingve).
2. Fina fragmento de informo pri la E-a teatraĵeto "Venko" el 1924, plenumata de anoj de E-klubo "Maljunuloj-rabistoj".
3. "Blua ponto" en Esperanto: kanto "Peterburg" de Chris Juwens kaj Paul Dean.

Pri la "oficiala parto" videoj mankas, ĉar mi zorgis pri videoj (estis kvin, i.a. majesta "La espero", plenumata de la peterburga guberniestra orkestro) sur la granda ekrano kaj interpretado de la festparolado pri Harmonio, kiun eldiris Jozef Willem Haazen - belga esperantisto, profesoro de la Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato.

Trovu la videon ĉi tie: <https://youtu.be/QbjMkonHMe0>

Andrej Grigorevskij

Hungaraj honorigoj

Ni konigas la novaĵon kun ĝojo, ke hodiaŭ estas la 10a datreveno, de kiam ni tradicie rememoras tiujn membrojn, kiuj estas esperantistoj almenaŭ 50 jarojn. Ĉi-okaze Hungaria Esperanto-Asocio transdonis kaj transdonas memoran honordiplomon al la koncernuloj. Vi povas legi la liston de tiuj esperantistoj, kiuj ricevis agnoskon, kaj vi povas vidi la memorkartojn [sur ĉi tiu ligilo](#). La listo plivastiĝos kun la pasado de tempo.

NAGY János, ekonomia vicprezidanto, operacia aferzorganto

Printempo ne en Parizo, sed en Greziljono

Jen la ĉefaj programeroj en preparo:

- ▶ [Kurso por la niveloj A1-A2](#) « Ni kuneku ! » gvidata de Marion Quenut
- ▶ [Kurso por prepari ekzamenon B1](#) « La Varsovia Metodo » gvidata de Paweł Fischer-Kotowski
- ▶ [Kurso por prepari ekzamenon B2](#) « El akveroj fariĝas riveroj » gvidata de Szilva Szabolcs
- ▶ [Kurso por prepari ekzamenon C1](#) « La Bjalistoka Metodo » gvidata de Przemek Wierzbowski
- ▶ [Internaciaj KER-ekzamenoj](#) de UEA
- ▶ Prelego, koncerto, migrado, joko ktp. *detaloj surloke* :
- ▶ Universalaj Kongresoj, la ideo, historio, kuriozaĵoj - *Paweł Fischer-Kotowski* ?
- ▶ Historio de la Esperanto-movado - *Paweł Fischer-Kotowski* ?
- ▶ Libroservo surloke, [vidu liston](#)
- ▶ NB: Iu instruisto taksas la nivelon antaŭ la staĝo per skriba kaj parola testo

Sekvas utilaj ligiloj

- ▶ [Programo de la kursoj, seminario kaj ekzameno](#) --- [Menuoj](#)
- ▶ [Prezoj kaj aliĝilo](#) --- [Aliĝintoj kaj iliaj loĝlokoj](#)
- ▶ [Foto de tiu ĉi staĝo](#) --- [Fotoalbumoj, filmetoj de pasintaj staĝoj](#) --- [Grupfotoj](#)
- ▶ [Intervjuo kun la responsanto de la staĝo](#)
- ▶ Opinioj de partoprenintoj: [Ekzamena sesio 2018](#) --- [pasintaj staĝoj](#) --- [Esperanto-Aktiv 109](#)

La Kulturdomo Greziljono organizas KUNLABORE kun [ILEI](#) (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kursojn por personoj kiuj komencis lerni E-on kaj deziras rapide progresi per intensaj kursoj gvidataj de tre spertaj instruistoj kiuj uzos E-on por instrui per aktivaj metodoj. Ni proponas kvar nivelojn (kursojn).

Nova kurso en Ĉinio laŭ la BEK-sistemo

La redaktoro de [edukado.net](#) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: BEKkurso de leg-societo

Gvidantonomo: GONG Xiaofeng

Tipo: Nova movada kurso

Loko: NANCHANG, Ĉinio.

Aldoninto: Arko

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27498>

Nova kurso en Meksiko

La redaktoro de [edukado.net](#) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso de Esperanto

Gvidantonomo: Gilda Muñoz Bonilla

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Tihuano, Meksiko

Aldoninto: gildamunoz

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27497>

Kontribuu pri lingva tradukado

La Asocio de Instruistoj de Vivaj Lingvoj instigas sendi sciencajn artikolojn pri lingvo-instruado kaj tradukado al la revuoj *Translang* kaj *Langues modernes* prizorgataj de la Universitato de Orano laŭ la kutima metodo de kontrolo fare de samfakuloj en kelkaj lingvoj. laŭ la revuo:

<https://www.aplv-languesmodernes.org/spip.php?article9706>

IKEF aktivas ĉiudimanĉe – jen tutjara aliro

Nia komerca kaj financa faka asocio (nova kunlaboranto kun EKO) organizas retan kunvenon ĉiu-dimanĉe, pere de *Zoom* kaj *Voov* (ĉefe uzata en Azio). Kun tioma reguleco de kunvenoj, la informoj venas tro malfrue por aperigo en EKO. Sed ili anoncis la aliron por *Zoom*, kiu validos tra la tuta jaro 2023. Aliro al la platformo Zoom:

<https://us06web.zoom.us/j/4450123381?pwd=NGpwakF4dWhtcUlzSGJDR2JPT3AxQT09>

Kunvena kodo: 445 012 3381

Pasvorto: ikef2023

(Join by Skype for Business)

<https://us06web.zoom.us/j/4450123381>

Do, se vi interesiĝas pri komerco kaj la agado de IKE, provu ĉeesti foje. Certe IKEF laŭpete aldonos vin al sia dissendo-listo, por ke vi ricevu la regulajn informojn pri la temo kaj preleganto de la semajno. IKEF unikas inter fakaj asocioj. Ĝia membraro plej fortas en Azio kaj aliaj kontinentoj, kaj plej malfortas en Eŭropo!



Paska kunvenigo de esperantaj familioj kaj aliaj

Temas pri la Printempa Semajno Internacia (PSI), renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio, kiu ĉiujare okazas dum Pasko (psi.esperanto.de). Post la pandemio ni (psi.esperanto.de/teamo) volas reaktivigi ĝin kaj samtempe pli internaciigi kaj iomete junigi ĝin. Pro tio ni petas vin sendi la suban tekston kaj la alkröcitajn dosierojn baldaŭ al la membroj de via komunumo. Ni petas vin meti nian adreson (psi@esperanto.de) je Bcc:, kiam vi sendas la mesaĝon al viaj membroj aŭ al aliaj. Ni

multe dankas pro via helpo.

La alkröcita PDF donas pli da informoj pri la evento en Wittenberg en la regiono Saksonio-Alhalt, en the nord-orienta Germanio.

Stefan Krieghoff kaj Ralf Haumer
nome de la PSI-organiza teamo de la Germana Esperanto Asocio

===== vortoj: 950 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@icloud.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

Iris jan 6, RM ene jan 7 GK jan 8